



aktuala

36-a ELDONJARO

Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com. Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

Abona membriĝo nur por adresoj en Belgujo, 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52 ; Eltiro 150 ekzempleroj.
 In formoj : www.esperantobruselo.org ; aktuala.retejo.net ; br11.leadhoster.com ; ebg.skynetblogs.be ; uea.org ; paulo.retejo.net ; barelo.blogspot.com ; esperanto.net ; esperanto.be ; lernu.net ; liberafolio.org ; eo.eventeio.net
 Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

ENHAVO

- Paĝo 2 - Fotaĵaro de Esperantista Brusela Grupo
- Paĝo 4 - Poemaro Alberto Garcia, Benedicto Silva, Kálmán Kalocsay
- Paĝo 5 - Marc Demonty pri Bunta Kvartalo en Bruselo
- Paĝo 6 - Atesto de Hubert de Meyere por PEKO en Mozet, Namur
- Paĝo 7 - Liba Gabalda pri Kongresoj en Liberec (IFEF) kaj Sète
- Paĝo 11 - Marcel Delforge pri Transsiberia vojaĝo al Ulanbatoro
- Paĝo 14 - Pri Protestantismo, Luteranismo kaj Calvinismo

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

Junio 2011

- 01 Eric Baert prelegis pri lia laboro en Kongo Belga dum 1963-1967
- 08 Vladimira Chvatalova pri Vojaĝoj tra Benino, Togolando, Ganao kaj orfejo Nabouba
- 15 Angelos Tsirimokos pri Kalendaro kaj Origino de la Semajno
- 22 Nikolao de Buyl organizis komunan vespermanĝo ĉe afriketosa restoracio
- 28-2.7 70a Hispana E-Kongreso en San Lorenzo de Escorial, Madrido
- 29 Lasta semajna kunveno kun babilado pri ferioj por kiu deziros
EBGrupo ferias dum Julio kaj Aŭgusto kaj duono de Septembro

Julio 2011

- 09-16 47aj Baltiaj Esperantaj Tagoj el Priekuli translokiĝis al Malspils, Latvujo
- 23-30 96a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago, Danujo
- 30-6.8 84a SAT Kongreso en Sarajevo, Bosnujo-Hercegovino

Septembro 2011

- 14 Bernard-Regis Larue prelegas pri sia vojaĝo al insulo Malto (vidu paĝo 19)
- 21 Rodica Todor el Rumanujo, nova prezidanto de IFEF honoras EBG kun vizito
- 28 Trevor Steele el Aŭstralujo revenas kaj revizitas nin prelegante pri siaj verkoj
Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci

FOTAĴARO DE ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO



Marcel Delforge, sidante dekstre en fotoj, prelegis la 4an de Majo 2011 en EBG pri lia granda transsiberia trajna vojaĝo dum la somero de 2010 ek de la 26a REK Rusuja E-Kongreso de Sanktpeterburgo ĝis la 6a Tutazia E-Kongreso de Ulanbatoro. Estis dek partoprenantoj kun la fotanto, kun helpo de Hugo de Kayzer, komputilisto kaj retestro de EBG, oni sukcesis funkciigi komputilon kaj projektilon por la prelego. En aparta salono kiel kutime funkciis la progresanta perfektiga kunveno, sed ĉi-foje kunprenante ankaŭ la komencantan enkondukan kurson pro paska ferio de instruistino Fransuaz en Bretonujo - ilia foto mankas bedaŭrinde : <http://br11.leadhoster.com/110504>



Geestraranoj de EBG, Nikolao De Buyl kaj Fransuaz Pellegrin senatende renkontis ĉi-tiun bruselan malkonatan esperantiston kun verda ĉapo, atendante senrezulte spekti koreajn ŝnurdancistinojn, el kiuj du kun E-bluzo lernantinoj de Esperanto, en la Granda Placo de Bruselo ĵaude la 5an de Majo 2011 inter 14h00 kaj 16h00, laŭ informo de Herman Deceuninck kaj de Lee Jungkee memanstataŭnomata Ŝlosilo, eksa prezidanto de Korea E-Asocio kaj de Azia Fakasocio de UEA.

Komencanta grupo la 11an de Majo



Progresanta grupo la 11an de Majo



Pinto de Sousa pri Tradukado la 11an de Majo



Estraro Respondas kun Osmo Buller la 14an de Majo dum Malferma Tago de Centra Oficejo UEA



Belganoj en UEA la 14an de Majo



Eduard Kusters pri Belga Kompromiso 18an Majo



PEKo kun partoprenantoj de EBG 20-22 de Majo



Tom Neil pri sia lando Skotlando 25an Majo



Tom Neil kun membroj de EBG 25an de Majo



Eric Baert pri eksa Belga Kongo 1an de Junio



Vladka Chvatalova pri Afrikaj Vojaĝoj 8an Junio



E-Klubo Braŝovo tra Delto de Danubo 1-6 Junio



<http://br11.leadhoster.com/ee.html>

3

4

POEMARO: KOŜMARAJ DISTIMIĜOJ

"En mia fantazia fatkoŝmaro
mi sentas kiel mortiĝas la jaro...."

Rigardu kiel la jaro suferas:
la jaro, havas malsana-deklivon;
la jaro, kiel fumo malaperas;
la jaro, rapide ne havos vivon.

En la ulcero-vundo de la tagoj,
tempo-fluo de minutoj foriras;
horoj el melankoliaj imagoj
pri la pasintada tempo sopiras.

Tagoj kaj tagoj al forpasi
lasas en la senfina, historiojn;
kaj en la animo, la emociojn
de la vivo-aventuro sen taksi.

Tra sonĝa tempo ĉiam pasio
estas via fatalo sen komparo,
skribante nian vivon en l' stelaro

de zodiaka kosma agonio;
laŭ l' universala kronologio:
ĝi mortas sed naskiĝas nova jaro!

Alberto Garcia Orive, Bilbao, 3-12-2010

VIVOFLUO

Rivereto murmuranta
en la koro de l' arbaro
fluas kante kaj senhalte,
malgraŭ ĉia, ĉia baro ...

Tia estas mia vivo
en la sino de l' homaro;
ĝoje finas ĝi senĉese,
malgraŭ ĉia viv-amaro...

Benedicto Silva, Brazilo

STREĈITA KORDO

Streĉita kordo! Ĝojo kaj lamento
Vibrigis vin. Sed ili al la brust'
Delonge fremdas kaj indiferento
Jam kovras ilin per dikpolva krust'.
Kordo, vi longe kuŝis en silento,
Jam eble vi eĉ raŭkas pro la rust'...
Resonu tamen la kaŝitajn kantojn,
Vi eble povos trovi aŭskultantojn.

Malnovaj kantoj! Ho, ĉu estas ili
La miaj do? Mi ja ne scias mem.
Ĉu sentojn tiel povis mi ekzili,
Ke min ne tuŝas jam ilia trem'?'
Ĉu tiel povas mi min malsimili,
Ke sen kompren' mi miras pri poem',
Kiun mi kantis iam larme, sange?
Ho, jes ja, tiel estas, eĉ se strange.

Mi iris, iris tra la vivo vage
Kaj vibris mia kordo sub la arĉ',
Kantante: ĉu revadas mi senage,
Aŭ ŝvite penas mi sub peza ŝarĝ',
Ĉu al ĉiel' mi pafas ĝojon sage,
Aŭ malespere dronas mi en marĉ'...
Sed — ĉu mi scias tion el memoro,
Aŭ nur el eho de la kordsonoro?

Aŭ, ĉu mi sonĝas nur? Jen, mi ekridas
Pri l' malprudenta, erarvaga ir'.
Ok jaroj paŝis. Nun jam takte bridas
Piedojn siajn la matura vir'.
En mia kor' freneze ne avidas,
Nur moderflame brulas la dezir',
Jes ja, mi iĝis pli prudenta, saĝa,
Pli filozofa, ĉar, ho ve, pli aĝa.

Sed tamen, ĉu nur sonĝo, ĉu memoro
Estas la bildoj de l' ŝaŭmanta Jun',
Kiu vetlarmis kun la nuba ploro,
Kiu vetridis kun la ora sun':
Streĉita kordo de l' streĉita koro,
El sub la rusto eksonoru nun!
Disflugu velka kanto, velka sento:
Folifataj' kirlita de la vento!

La fremdiĝinta tinto de liuto
Kun ĉia sia tede tikla rim'
El ĝena troproksim', per vasta ŝuto,
Forflugu al la fremda malproksim',
La kantojn, kiuj premis min per muto,
Mi fine ĵetu jam el la anim',
Kiel balaston ĵetas la balono,
Por flugi al pli alta regiono.

Kálmán Kalocsay(1892-1976)

BUNTA KVARTALO

Bunta kvartalo en la centro de Bruselo. Per tiu-ĉi modesta artikoleto mi ŝatus iniciati novan serion en Aktuala, nome pri Bruselaj temoj, rekte ligitaj kun Esperanto aŭ ne... Se iu(j) sekvas min, tio eble fariĝos serio. Se ne, estos izola artikolo, kiu espereble tamen interesos la legantojn. Persone mi ne havas multajn ideojn pri aliaj temoj, krom eventuale la ligoj de la komunumo Anderlecht kun Esperanto kaj ĝia "interna ideo".

Inaŭgurante la serion, mi volas elvoki kvartalon en la centro de Bruselo, ofte pli konatan de la turistoj ol de la Bruselanoj mem. Temas pri la kvartalo sankta Jakobo, kies limoj ne estas tute precizaj (pli malpli en triangulo formita de la Borso, la Fontainas placo kaj la placo Sankta Johano). Multaj el ni konas la kvartalon almenaŭ pro tio, ke ni jam plurfoje festmanĝis tie, i.a. okaze de la cent-jariĝo de la grupo kaj de festetoj en junio en restoracio Rugantino, sur la Anspach bulvarado.

La koro de tiu kvartalo estas la preĝejo N-D du Bon Secours/OLV Van Bijstand, belega kirko troviĝanta en la duon piediranta strato Karbomerkato. Mi ne detaligos ĉiujn vidindaĵojn en ĝi, sed volas substreki, ke ĝi estis iam frekventata de la pilgrimantoj al Santiago. Ĝia arkitektura koncepto garantias bonegan akustikon, pro tio ofte okazas koncertoj tie. Atentu ankaŭ la valorplenajn ŝkulptaĵojn kaj pentraĵojn; en la horejo oni povas vidi arbotrunko

⁵
kun la parolo "Paco" en diversaj lingvoj, inkluzive de Esperanto.

La apuda strato, kies nomo (rue des Grands Carmes/ Lievevrouwbroersstraat) atestas ke tie staris iam monaĥejo, kiun oni ankoraŭ povas imagi dank'al mura pentraĵo. Krome la kvartalon ornamas aliaj muraj pentraĵoj, inspiritaj de diversaj famaj belgaj bildstrioj. Ĝenerale temas pri kvartalo kun multaj butikoj, trinkejoj kaj restoracioj, ofte kun terasoj. La restoracioj prezentas diversajn kuirartojn, ekde la plej banalaj nome la itala, la franca ktp ĝis la plej maloftaj, almenaŭ en Bruselo, ekzemple etiopia, kuba, ktp.

Tiu ĉirkauaĵo estas ankaŭ ofte konsiderata kiel rendezuo de samseksemuloj, kiuj volonte frekventas la samajn trinkejojn, butikojn ktp. Tio tamen ne signifas ke ĝi estas rezervita por gejoj, ne kredu tion... Krome, ĝi estas ankaŭ rendezuo de libroŝatantoj, ĉar troviĝas multaj butikoj tie kie oni povas aĉeti librojn favorpreze. Mi mem apartenas al tiu lasta kategorio kaj trovis tie centojn (?) da libroj de la plej diversaj epokoj, en la plej diversaj lingvoj.

Multaj stratoj havas duoblan nomojn, t.e. la oficialan, kaj alian ligitan kun la belga bildstrio aŭ la folkloro. Ekzemple, la strato Jardin des Olives/ Olivetenhof, nomiĝas ne oficiale (sed kiu atentis tion krom la turistoj?) strato de la Blanco Tigrino. Alia reprezentantino de la brusela folkloro estas "Madame Chapeau" kiu intervenas en fama brusela

⁶
teatraĵo. Ŝi havas sian statuon je la angulo de la Sudstrato kaj de la strato de la Paseroj. Kiam oni senpripense alproksimiĝas al ŝi, oni preskaŭ kredas ke temas pri vera sinjorineto, kies tipo bedaŭrinde preskaŭ malaperis de la bruselaj stratoj.

Daŭrigante la Sudstraton, oni preterpasos la Artakademion kaj alvenas al la Rouppe placo, kie troviĝas la fama restoracio "Comme chez Soi". Daŭrigante ĝin en la direkto de la centro oni alvenas al la Borso, la preĝejo Sankta Nikolao, kaj kompreneble la Granda Placo. Tute proksime la turistoj iras saluti "Manneken Pis". Do, tiu kvartalo troviĝas fakte tre proksime de la ĉefaj vidindaĵoj de la centro de Bruselo.

Pro diversaj kialoj, bibliofilaj kaj gastronomiaj, mi sentas min ligita kun tiuj kelkaj stratoj, do mi volonte (kun) gvidus promenadon tra tiu kvartalo se estas sufiĉa interesiĝo. Tio povus okazi en septembro aŭ oktobro. Interesuloj bonvolu kontakti min telefone (02. 569 31 33).

Marc Demonty

ATESTO DE HUBERT

Atesto de Hubert De Meyere por PEKo, Unua Printempa Esperantista Kongreso, Kastelo de Mozet, ekde la 20a ĝis la 22a de majo 2011 pri «Plibonigi la komprenon inter belgaj komunumoj» estis temo de la kunveno.

0. Resumo

Post pluraj generacioj, kvankam de belga nacienco, idoj de elmigrantaj italoj ankoraŭ ĉiam sentas sin

italoj. Male, post malpli ol unu generacio en Valonujo, flandro tute ne plu sentas sin flandro. Kial? Hodiaŭa kazo : la mia.

1. Jen miaj ĉefaj trajtoj

Mi estas esperantisto, flandrodevena, franclingve edukita. Mi loĝas en Belgujo, lando kiu apartenas al Eŭropa Unio. Mia loĝregiono nomiĝas Valonujo.

2. Avertito : mi verŝajne ŝokos kelkulojn.

Mi sincere deklaras ke ŝoki estas nek mia volo nek mia celo.

Ĉar mi devas fari sendetalan prezenton, mi iomete «sennuancis» ĝin. Mi ege klopodis por starigi mian opinion. Vidu titolojn de kelkaj ĉeflibroj kiujn mi studis.

Mi delonge spertis ke multaj homoj ne volas aŭdi iun veron. Jen ekzemplo : dum mia prelego pri Belgujo en Coma Ruga, Katalunujo, en oktobro 2010, iu antverpena esperantistino koleris, ĉar mi uzis la vorton «ekstremisto». Por kvietigi ŝin, mi proponis «naciisto» kio tute kontentigis ŝin. Laŭ mi, naciista konduto (ne konfuzu kun patriotisma), estas ege pli malbona. Mi forgumis la adjektivon en miaj postaj prelegoj ĉar mi provas "ne importi" niajn belgajn kverelojn en esperantajn aranĝojn.

3. Kerna mesaĝo

Belgujo estas malsana kaŭze de malsaneco de siaj du ĉefaj komunumoj.

Flandrujo estas malsana kaŭze de sia malsprita naciismo, kaj pro siaj kompleksoj : malsupreco pro sia freŝa pasinto (lingvo, malriĉeco), supreco pro sia nuna prospero kaj povo. Ĝia konduto en la «brusela

problemo» estas grava videbla konsekvenco.

Valonujo estas malsana kaŭze de la malapero de sia antaŭa prospero, kaj pro unu jarcento de socialismo, ĉefe duonjarcento de plena superregado.

La kialoj de niaj belgaj problemoj tute ne estas lingvaj sed socialaj kaj ekonomiaj. La plej seriozaj kialoj estis, kaj ankoraŭ estas, netoleremo kaj manko de reciproka respekto.

Hodiaŭ, ni trovas nin en klasika situacio nomita «funela situacio». Ju pli oni premas por eliri, des pli la blokado kreskas. La plej racia solvo estus malantaŭen iri. Laŭ mi, la historiaj ĉefaj kialoj por rifuzi plurlingvan ŝtaton hodiaŭ ne plu ekzistas. En la januara eldono de «Monato» mi legis ke dividi la landon eblas nur post generacioj!

4. Argumentoj kaj kelkaj trafikaj ekzemploj

En Valonujo, la socialista partio superregis la politikan kaj socialan vivon dum pli ol kvindek jaroj. Korupton kaj malbonan regadon oni freŝdate publike malaprobis. Ne estas nur anekdoto : nia antaŭa pastro, kiu estas flandrovena kaj studis kiel mia patro en la malgranda seminario de Roeselare (sed li daŭrigis), ofte diris : en valonujo, la realo estas «socialisto aŭ neniom da pano».

En Flandrujo, "Franskillon"-oj kaj "Flamingand"-oj estis ege gravaj historiaj aktoroj. *Proponitaj tradukoj de la du vortoj : aĉfrancemuloj (=flandraj franclingvanoj) kaj aĉflandremuloj (=flandrismanoj), mallongigitaj en la sekvo respektive per FR kaj FL.*

De la konfliktoj inter FR kaj FL naskiĝis naciismo en Flandrujo. Oni bone konas la aĉajn kondutojn kiujn naciismo estigas preskaŭ ĉiam. Pri tio mi ne volas insisti, sed feliĉe, en Belgujo, oni ne ankoraŭ pafis sin unu la aliajn !

Nun en Flandrujo, la FL sukcesis kontroli preskaŭ ĉion, dank'al tenado de la plej gravaj postenoj : amaskomunikiloj, universitatoj, lernejoj, financaj kaj ekonomiaj decidaĵoj. Ĉu eĉ en esperantaj movadoj ?...Mi timas ke «jes» !

Hubert de Meyere

IFEF KONGRESO

La 63a Internacia Fervojista Esperanto-Federacia Kongreso de la 7a -14a de majo 2011. Ĉeĥaj esperantistoj preparis por fervojistoj eksterordinare bonan IFEF kongreson en la bela nordbohemia urbo Liberec. La aranĝo okazis en la luksa Centro Babylon. Partoprenis ĝin 173 geesperantistoj el 18 landoj. Jam sabate, ĉe la alveno, la loka komitato kunsidis. Vespere okazis interkonatiĝo. Centro Babylon estas komplekso enhavanta hotelon, restoraciojn, konferencojn, amuzejojn, naĝejon, butikojn kaj aliajn instalaĵojn.

Dimanĉa solena inaŭguro komenciĝis gaje per dancoj kaj kantoj fare de lernejana infangrupo "Jizerka". Infanoj estis bele kostumitaj. Sur podio trafe ornamita per la slogano "La reloj ligas la landojn, Esperanto la popolojn" eksidis gravuloj, kiuj salutis kaj bonvenigis la ĉeestantojn. Sekvis salutoj de landaj sekcioj de IFEF kaj oni legis

8

plurajn alvenintajn salutmesaĝojn kaj bondezirojn de eminentuloj. Pro siaj meritplenaj agadoj por IFEF estis honorigitaj s-ino Anna Abelovská, kiu multe zorgis por bona disvolviĝo de la kongreso, la prezidanto de LKK s-ro Ladislav Kovář kaj s-ro Jindřich Tomášek, kiu konstante kontribuas al diversaj revuoj tradukante novaĵojn el la fervojsfero por la internacia esperantistaro. Post la kantado de Esperanto-himno la prezidantino de IFEF Rodica Todor el Rumanio malfermis la kongreson. Antaŭ la komuna fotado sub la bonveniga banderolo de la hotelo Babylon kelkaj partoprenantoj prezentiĝis en siaj fervojistaj uniformoj. Vespere por ni koncertis ĥoro Bendl el Česká Třebová, kies du membroj Marie kaj Alois Klumpar ankaŭ kongresis kun ni. El Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, venis kvarpersona delegacio kun la urbestro s-ro Gerhard Walter por prezenti la urbon kaj varbi por la venontjara IFEF-kongreso, kiu okazos tie de la 19a ĝis la 25a de majo. Je la fino de la kongreso estis transdonita la banderolo kun la listo de la okazintaj kongresoj.

Belega kaj bunte ilustrita invitbroŝuro konatigis nin kun vidindaĵoj de Liberec, ĝia ĉirkaŭaĵo kaj prezentis al ni la ekskursan programon. La kongresa libro enhavis ĉiujn aliajn necesajn informojn. En la kongresa teko troviĝis aliaj dokumentoj kaj donacetoj de la fervojo. Efektive ni estis plurfoje pridonacitaj. Krome la urba administracio de Liberec donacis al ĉiuj partoprenantoj

senpagan veturadon per publikaj transportiloj dum la kongresa semajno.

Fervojistoj havis okazon en siaj kunsidoj trakti diversajn aktualaĵojn kaj movadajn aferojn. Dum la prelegoj kaj fakaj kunvenoj oni eksciis pri sekurecsistemoj kaj instalaĵoj, pri trajntrafikregado, pri eŭropaj fervojkoridoroj. Oni parolis ankaŭ pri aliaj interesaj temoj. Estis menciita nova moderna kaj multifunkcia trafikterminalo en la urbo Česká Třebová, inaŭgurita pasintjare en septembro. Ĝi ricevas premiojn pro efika investo.

Bone funkciis libroservo, estis eldonitaj E-bildkartoj kaj glumarkoj pri la kongreso. Porokazan stampadon prizorgis oficistinoj de la Ĉeĥa Poŝto. Ĉiutage aperis Kongresa Bulteno, el kiu ni eksciis pri okazintaj eventoj. Ankaŭ la ĉeĥa ĵurnalo "Mladá fronta Dnes" raportis pri la kongreso. Radioamatoroj povis radie kontakti aliajn interesulojn de tiu-ĉi hobia.

Dum la tri duontagaj ekskursoj la partoprenantoj konatiĝis kun kelkaj historiaj vidindaĵoj de Liberec, pri kiuj parolis la loka esperantisto Miroslav Kazdera en siaj prelegoj kaj promeno tra la urbo de li gvidita. Ni ankaŭ vizitis belan botanikan ĝardenon kaj unikan Zoo-ĝardenon kun blankaj tigroj kaj aliaj ekzotikaj bestoj. Krome allogis ekskurso al la Valo de Kristoforo. Tie oni admiris astronomian horloĝon kaj romantikan trajnponton. Ne pretervidebla estas la monto "Ještěd" kun sia dominanta

telekomunika blank-argenta turo kun hotelo.



63-a IFEF KONGRESO



LIBEREC - ĈEĤO



7 - 14 majo 2011



Fotoj kaj aranĝoj Liba kaj Floreal Gabalda

Tuttaga ekskurso gvidis iujn partoprenantojn al Prago, alia celis viziton de du regionaj kasteloj. Ambaŭ ekskursoj kontentigis ĉiujn. El vesperaj programeroj elstaris la Internacia balo kun tombolo kaj abunda bufedo. Ne mankis la tipa ĉeha (saniga) likvoro “Becherovka”, kiun ĉiuj povis laŭplaĉe konsumi. Per siaj kantoj ĝojigis nin la famkonata kaj ŝatata JoMo el Tuluzo. Krom li koncertis simfonia orkestro, ĵaza grupo “Big Band” kaj la popola muzikgrupo “Dudáček”, kiu uzis, krom aliaj instrumentoj, ankaŭ tipan sakfajfilon. Ĉiuj vesperaj prezentoj plaĉis al la publiko, pri kio atestis longaj kaj entuziasmaj aplaŭdoj. IFEF okazis en Ĉeĥio la trian fojon. Koran dankon al la organizantoj de la ĉi-jara brila

9 kongreso. La impresoj estas bonegaj!!! Ĉiuj estis ravitaj kaj ege kontentaj hejmenirante kun belaj kaj neforgeseblaj travivaĵoj. Espereble ankaŭ la venontjara IFEF allogos multajn esperantistojn al Herzberg.

Liba Gabalda

SÈTE ESPERANTUMADO

Internacia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo 22a-26a de aprilo 2011. Ĝi okazis ĉe la Mediteranea maro en la urbo Seto (Sète). Ĝi estis bone organizita. La aranĝon partoprenis ĉirkaŭ kvarcent esperantistoj ne nur el Francio, sed ankaŭ el foraj landoj. Venis gastoj el Japanio, Kubo, Nepalo, Rusio kaj el pluraj eŭropaj landoj. La inaŭguron ĉeestis la urbestro kaj la vicurbestro de la urbo Seto. La urbestro s-ro François Commeinhes bonvenigis nin kaj deziris al ĉiuj agrablan restadon. Poste sinsekve salutis la publikon reprezentantoj de diversaj organizaĵoj kaj esperantistoj el ĉeestantaj landoj. Sekvis invito al honorvino. Ĉe la strando ni komune fotiĝis. La aranĝo okazis ne tro malproksime de la urbocentro en la familia feriejo “Le Lazaret”. Tie estis ĉio necesa por akcepti la partoprenantojn. Riĉa taga, vespera kaj ekskursprogramo kontribuis al bona etoso dum kvin tagoj plenumante dezirojn de ĉiuj ĉeestantoj. La oferto de prelegoj estis abunda. Kompreneble (kiel ofte okazas en ĉiuj E-aranĝoj) ne eblis ĉeesti ĉiujn proponitajn programerojn ĉar pluraj okazis samtempe. Kunvenis kaj kunsidis Espéranto-France, Sat-

10 Amikaro, Fervojistoj, FET, EDE kaj aliaj. Ĉiuj asocioj kaj laborgrupoj havis eblecon labori kaj diskuti pri siaj agadoj kaj organizaj aferoj. Okazis KER-ekzamenoj. Ni spektis premieron de interesa dokumenta filmo pri Esperanto. Plue ni eksciis kiel Esperanto helpis al migranto el Kongo al Francio por ricevi politikan azilon. Sekvis diskuto pri helpo al rifuĝintoj en tiu-ĉi ne facila situacio. La japanino Sanpei Keiko parolis pri la antaŭ nelonge okazinta tertremo kaj cunamo en Sendai. S-ro Narendra Raj Bhattarai el Nepalo rakontis pri sia lando, respondis al multaj demandoj kaj invitis al la Internaciaj Himalajaj Renkontiĝoj, kiuj okazas ĉiun duan jaron. Pri la E-edukado ĉe Interreto parolis kaj la atelieron pri Vikipedio gvidis Marek Blahuš el Ĉeĥio. Fervojistoj parolis pri vagonara signalado kaj André Mirc prezentis mallongan dokumenton pri la rapideco de trajnoj. La humuron en verkoj de Lorjak kaj Beaucaire prezentis Jak le Puil, pri Ker-ekzamenoj informis Katalin Kováts, pri Majaa kulturo kaj kalendaro Philippe Chavignon, pri Kubo Maritza Gutierrez González, pri la lasta verko de Jules Verne Abel Montagut, pri peresperanta solidareco en Bosnio parolis Senad Coliĉ. Pri langvedoka historio informis kaj bildojn prezentis Arno Lagrange. Okazis forumo pri la okcitana lingvo kaj aliaj interesaj programeroj. Dum la interkona vespero akordionludis Famo. Li ankaŭ akompanis koncerton de Jacques Yvart. En la urba salono “Brassens” la fama kataluna

ensemblo Kaj Tiel Plu kaj la frisa ensemblo Kapriol’ kantis kaj vigle dancigis la ĉeestantojn. La etoso estiĝis plaĉa kaj gaja. La lastan adiaŭan vesperon ni spektis tri programerojn: La Teatra Trupo de Tuluzo prezentis “Grandioza Kongreso” verkita de Rikardo Cash. Patric ofertis al ni serion da okcitanaĵoj. JoMo prezentigis unuafoje kun la muzikistoj kaj dancensemblo Solniška. Ĝi estis admirinda kaj neforgesebla slavecstila spektaklo kaj cigana etoso per kiuj finiĝis la lasta vespero. Okazis pluraj duontagaj ekskursoj. Eblis promeni sur la monteto “Saint-Clair” kaj ĝui belan panoramon de la urbo aŭ ŝippromeni en la haveno de Seto kaj spekti fiŝaŭkcion laŭ nuna moderna elektronika maniero. En Cap d’Agde ni vizitis lokan muzeon pri kolekto de trovitaĵoj en akvo kaj poste la nigran strandon el bazalteroj. Dum la lunda tuttaga ekskurso ni malkovris la Sudan Kanalon, navigis sur ĝi per ŝipo trapasante plurajn kluzojn kaj admiris ĉirkaŭan pejzaĝon dum bongusta tagmanĝo. Poste ni aŭskultis historion de vinberkultivisto kaj gustumis plurajn speciojn da lokaj vinoj. Ĉe la fino de la ekskurso ni promenis en restaĵoj de opidumo (antikva fortigita loko per remparo kaj fosaĵo) kaj trarigardis muzeon pri arkeologiaĵoj. Alia samtaga ekskurso gvidis la interesulojn al Eta Kamargo. Dum la marda tuttaga ekskurso ni vojaĝis per vaportrajno tra la pitoreskaj cevenaj montetoj de Anduze ĝis St. Jean-du-Gard.



IREM



SETO - FRANCO



22 - 26 aprilo 2011



Fotos kaj aranĝoj Liba kaj Florel Gabalda

Tie ni tagmanĝis kaŝtanaĵn specialaĵojn en belstila restoracio. Sekvis vizito al ekzotika bambuejo. Admirindaj estis ne nur bambuaj aleoj kaj arbaro, gigantaj sekvojoj kaj palmoj, sed ankaŭ multaj belaj floroj, kaktaj kaj bonsaĵoj en aparte bela naturo. Laste ni vizitis muzeon pri historiaj kamparanaj tradicioj, pri produktado de silko, bredado de silkraŭpoj kaj krome ni vidis aliajn interesajn aĵojn. En la ampleksa kaj belaspekta broŝuro ni trovis, krom la programo de la renkontiĝo kaj praktikaj informoj, mapojn pri la urbo kaj loko kie ni estis, historion de la regiono Langvedoko, informojn pri la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo kaj raportojn pri aliaj allogaĵoj de la regiono. Estis eldonitaj E-bildkarto, poŝt- kaj glumarkoj. Dum la libera tempo eblis rigardi kaj aĉetumi en bone proviziita

libroservo. Ĝin prizorgis pluraj asocioj. Oni ekspoziciis multan materialon por vendi: librojn, muzikdiskojn, bildkartojn, glumarkojn insignojn kaj aliajn kutimajn esperantaĵojn. La elekto estis abunda kaj varia. Bona ideo efektiviĝi komunan renkontiĝon de pluraj Esperanto-asocioj plensukcesis. Ni ĉiuj ĝuis agrablan restadon eĉ se la suno ne ĉiam favoris nin.

Liba Gabalda

TRANSIBERIA

Unue mi flugis al Sanktpeterburgo tra Rigo, kaj partoprenis la 26an REK, Rusujan E-Kongreson, 27an ĝis 31an de Majo de 2010, kun 250 partoprenantoj kies 50 eksterlandanoj. Solena malfermo, salutoj de eksterlandaj reprezentantoj, bonvenigaj salutoj de anoj de LKK - Loka Kongresa Komitato, koncerto de Jomart kaj Nataŝa, vizitado de fama muzeo Ermitaĵo en Vintra Palaco, vespera ŝippromenado tra la rivero "Nevo" sub siaj miloj da pontoj, dum tiel nomata Blanka Nokto, klasikaj koncertoj, kantoj de Georgo Handzlik, permetroaj vizitadoj. El Sanktpeterburgo al Moskvo grupo de eksterlandaj kongresanoj vojaĝis per nokta dormtraĵo sub gvidado de Svetlana Smetanina. Moskvo havas pli ol dek milionoj da loĝantoj, tiom kiom la tuta Belgujo. Tre bela urbo kun oportuna metroo kiu facile konektigas ĉiujn kvartalojn. Ene de metroostacioj, mirinde ornamitaj, svarmas popoloj kaj la vagonaroj brue kaj rapide alvenas kaj foriras. La vojaĝantoj kutime afablaj, tuj transdonas sidlokon al virinoj kun

infano, maljunuloj, handikapuloj. Parenteze mi tiam konstatis ke mi vere maljuniĝas!;-). Ĉefa vizitado en Moskvo estis la fama "Kremlin" grava administra centro de Rusujo, kun konstruaĵoj de multaj diversaj epokoj: preĝejoj, parkoj, giganta korto por paradmarŝoj, maŭzoleo Lenina. En tiu loko dum cara reĝimo, oni proklamis ordonojn aŭ leĝojn nomitaj "ukazojn" kaj oni ekzekutis kondamnitojn. Spuro de tio estas ronda mureto por malpermesi vidi iliajn turmentojn. Alia interesa vizito en Moskvo estas la malnova tombejo kaj apuda monaĥejo, kun tomboj de famaj homoj kiel artistoj, politikistoj, kun mirindaj skulptaĵoj ofte kun reprezentoj per bustoj, kaj medaloj. La Smolenska monaĥejo datiĝas de la cara reĝimo kun teruraj rakontoj pri la kruelaj sintenoj de tiu epoko. La tuta historio de Rusujo estas plenplena de murdoj, puĉoj, familiaj krimoj. Ni ankaŭ ŝippromenadis sur la rivero "Moskvo" kaj manĝis en diversaj memservaj restoracioj. Tra transsiberia trajno el Moskvo, ni startis en Kazana stacidomo. Sub la strikte severa sed afabla gvidado de Tatjana Loskutova, mi konatiĝis persone kun la grupo de eksterlandanoj. Nia grupo konsistis el 26 homoj: 1 el Belgujo, 1 el Italujo, 1 el Usono, 1 el Rusujo, 2 el Portugalujo, 2 el Nederlando, 18 el Francujo. Ni traveturis 6000 kilometroj dum 5 tagnoktoj. Preskaŭ unu semajno por atingi Mongolujon. Ni instaligiĝis en 4-loka kupeo, kun valizoj, sakoj, ktp, kaj ricevis mallarĝan matracon, koverton, littukojn por la nokto.

Post starto de la trajno ni atingis Kazan morgaŭan tagon, Jekaterinburg (Sverdlovsk), kelkaj tagoj kaj noktoj poste, kaj estis jam alia horzono. Poste Omsk, Novosibirsk kie lokaj esperantistoj atendis nin afable sur la kajo. Dum haltoj oni libere rajtas eltrajniĝi kaj aĉeti diversajn bongustajn manĝaĵojn kiel fragoj, glaciaĵoj, fumigitaj fiŝoj. Kaj denove nia trajno startas por atingi post du tagoj kaj duono Krasnojarsk, signifante Bela-ruĝa, 4 horoj diference de Moskvo. Ni tranoktis tien kaj vizitadis modernajn kaj antikvajn konstruaĵojn kun afablaj lokaj esperantistoj. Mi ne tiel imagis Siberion. Reen en la trajno, afablaj stevardinoj deĵoras en la vagonaro, ĉiam pretaj helpi al vi, ĉu vi ŝatus trinki, eblas uzi varman akvon, aŭ ĉu pro alia helpo. Fakte konstantaj linioj funkcias tra Siberio, kaj oni vojaĝas tra multaj arbaroj, betuloj, pinarboj, sed pro traĵo de multaj vilaĝoj oni neniam travivas izolecon. Despli ke dank'al multaj gefrancoj, ni povis survoje multe krokodili, ĉefe kun komencantinoj, kaj finfine ni atingis Irkutsk. Kiel juna knabo mi legis la romanon "Michel Strogoff" de Julio Verne kaj havis tutan alian ideon pri tiu mita loko. Mi imagis preskaŭ dezerta loko kun kruelaj tataroj, lupoj atakantaj ĉevaloj, ktp. Sed trovis modernan urbon. Ĝi situas 90 kilometrojn for de la lago Bajkal, kaj per buso oni kondukis nin tien. Ĝi estas la plej profunda kaj sensala lago en la mondo. Ni ŝippromenis kaj vespere tranoktis en lignodometoj, kvarope po ĉambro.



Feliĉe mi kunportis citronelon kontraŭ la kuloj kaj kontraŭ la moskitoj. Lokaj muzikistoj akordeonis rusajn konatajn kantojn dum ni manĝis kolbasojn ĉe fajro. Aliaj trajnoj direktiĝas al Vladivostok 4000 kilometroj for, kaj ni bezonis ankoraŭ 2 tagoj kaj 3 noktoj por atingi Ulanude ĉe la landlimo kun Mongolujo. Tie multaj kontroloj, pasportoj, stampoj, paperaĉoj, kaj finfine post kelkaj horoj ni atingis Ulanbatoron ĉefurbon de Mongolujo. Modernaj hoteloj ekzistas en Ulanbatoro. La 6a Tutazia E-Kongreso, 19a ĝis 23a de Junio 2010, okazis en luksa hotelo "Ghingis-Khan" kun 254 gekongresanoj el 33 landoj. La kongreso estis interesa kun multaj prelegoj, pli ol 30 fakkunsidoj, ekskursoj, lernado de mongola lingvo, skribado kaj cirila alfabeto, sed ne la tradicia mongola alfabeto malaperiganta. Mi trovis la lokan popolon tre simpatia kaj honesta havante restoracioj tre malmulte kostaj. Loka mono estas tugriko, fakte sen metalaj moneroj sed nur kun paperaj moneroj. Multaj bankoj ekzistas kun aŭtomataj monhaveblaj aparatoj. Koncerne la reenvojaĝo mi flugis aviadile tra Moskvo kaj Rigo ĝis Bruselo. Mi havis neniam iun ajn problemon dum la reirvojaĝo. Mi volas danki al ĉiuj, speciale al la organizantoj de la diversaj aranĝoj de tiu neforgesebla vojaĝo.

13
Pri historio de Mongolujo ek de la ŝtonepoko ekzistas spuroj el 800.000 jaroj antaŭ Kristo kaj de la glacia epoko 40.000 jaroj antaŭ Kristo, kiam homoj kaptis kaj manĝis idojn de leonoj, elefantoj, strutoj, rinoceroj. Bronzepoko okazis en tia metalhava regiono 2.000 jaroj poste Kristo kun fandado de kupraĵo, ankaŭ bredado de ĉevaloj, bovoj, ŝafoj. Spuro de Hunoj estis trovita ĉirkaŭ lago Bajkal el 200 jaroj antaŭ Kristo, kaj kiel sciite, ili venis eĉ okcidenten kun miloj da ĉevaloj. El la sepa jarcento oni trovis spurojn de fornego por fabriki ferajn armilojn por soldatoj. Ĉirkaŭ 1.200 antaŭ Kristo, Ghingis Khan unuiĝis multajn tribojn konkeris la grandan Mongolujon kaj sude Ĉinujon, iĝante Mongola Imperiestro de Ĉinujo. La Mongola Imperio iam enhavis Ĉinujon, Rusan stepon, Persion, Irakon, ktp. Multajn militojn kaj batalojn okazis por kapti la imperian tronon. En 1368 budisma religio estis adoptita. En 1636 Mongolujo fariĝis Mandĉuruja kolonio. En 1911 estis milito por reakiri sendependecon. En 1921 Rusujo helpis kaj Mongolujo liberiĝis de Ĉinujo. Tamen parto de Mongolujo, tiel nomata de ĉinoj "Interna Mongolujo" daŭre hodiaŭ ĝestas okupata kiel provinco de Ĉinujo. En 1937 estis granda arestado kun 20.000 homoj ekzekutitaj kaj 400 delegitoj mortpafitaj. En 1940/1941 Mongolujo helpis Rusujon militi kontraŭ germanaj faŝistoj. Post la milito estis kolekto de donacoj por soldatoj kaj la industrio progresis.

Marcel Delforge verkis, EBG prelego 4-5-2011

14

PRI PROTESTANTISMO LUTERO



Marteno Lutero aŭ Martin Luther (10-11-1483/18-02-1546) monaĥo aŭgustenana kaj germana profesoro, estas konsiderata la fondinto de protestantismo, unu el la tri ĉefaj branĉoj de kristanismo. Pro tio, li estis unu el la plej influaj homoj de la mondo. La 31-10-1517 li najlis sian 95 *Tezojn* al la pordego de preĝejo de Wittenberg, lia protesto kontraŭ la koruptado kaj diboŝado en la katolika eklezio de Romo. Ĉi tiu ago estis la origino de protestantismo. Kaj ankaŭ la origino de luteranismo, la unua protestanta sekto, kiu ankoraŭ estas la ĉefa sekto en Germanujo kaj Skandinavujo. Ekster ĉi tiu regiono, la plej grava protestantismo estas tiu de Zvinglo kaj Kalvino, kiu estis disvolvigita en Svislando dum 1520-60, kaj nun floras precipe inter anglalingvanoj.

Kvankam Lutero protestis kontraŭ la korupteco de la Eklezio, lia doktrino estis hereza laŭ katolikismo: li protestis ne nur kontraŭ la korupta uzo de aŭtoritato en la Eklezio, sed kontraŭ la ideo de aŭtoritato mem: la aŭtoritato de la Eklezio ne nur estis misuzita, sed estis senlegitima en si mem. La ĉefaj doktrinoj de Lutero, kiuj fariĝis la koro de protestantismo kiel herezo estis: *sola fide*; *sola scriptura* kaj *universala pastraro* (tio signifas pastrareco de ĉiu individua kredanto). En julio 1505, Lutero kvazaŭ mortis pro frapo de fulmo kaj promesis, "Sankta Ana, helpu min. Mi fariĝos monaĥo." Tiel li fariĝis aŭgustenana monaĥo. Lutero fariĝis sacerdoto en 1507 kaj en 1508 li estis sendita al la universitato de Wittenberg por studi Aristotela filosofio. En 1510 la aŭgustenanoj sendis lin al Romo pro iu afero. Romo ŝancelis Luteron: tie li vidis la diboĉadon de la korteganoj de la Eklezio. En 1512 li fariĝis doktoro kaj studis kaj instruis pri la Biblio, precipe pri la epistoloj de Paŭlo. En la monaĥejo kaj la universitato, Lutero praktikis severan sinregadon, pentofaradon kaj ofte konfesis siajn pekojn. Sed tio donis al li nek pacon de koro nek certecon de menso pri sia eterna savo. Sub la influo de sia amiko Johann von Staupitz, Lutero profunde studis la Biblion, ne nur profesie, sed por sia eterna savo. En la Biblio li fine trovis la solvon: *Ĉar la justeco de Dio malkaŝiĝas en ĝi de fido al fido, kiel estas skribite: La virtulo vivos per sia*

fideleco. (Romanoj 1:17). La savo de Kristo, Lutero finfine komprenis, ne venis de iu ajn faro de pento aŭ bono, sed sole per fido en Kristo mem, fido kiu estas donita per la graco (la senmerita favoro) de Dio. Tio fariĝis la doktrino *sola fide*, la koro de lia reformo. Pro lia nova kompreno pri la fido, li estis instigita protesti la praktikon de indulgenc-biletoj, per kiu negoco la Roma Eklezio korupte vendis pardonojn por la punoj de purgatorio.

LUTERANISMO


En 1517, Lutero najlis sian *Disputatio pro declaratione virtutis indulgentiarum*, alinomatan la 95 Tezojn al la pordego de preĝejo de Wittenerg, por protesti kontraŭ pardon-biletoj. Dum 1517-21 Lutero ne ribelis kontraŭ la Eklezio, sed penis reformi ĝin. En 1520 Lutero skribis tri leterojn kontraŭ la Eklezio: Letero al la papo *Pri kristana libereco* laŭ kio kristano estas savita sole per fido, ne per faroj (*sola fide*). Letero kontraŭ la sep sakramentoj de katolikismo *La babilona kaptito de la eklezio*. Lutero akceptis nur tri sakramentoj: Komunio, konfeson, bapton. *Publika letero al la kristana nobelaro de la germana nacio pri la reformo*, kontraŭ la diboĉado de la korteganoj de la Eklezio kaj pri la pastrareco de la kredantaro, ĉiuj kristanoj estas egalaj, la Biblio estas la sola aŭtoritato pri la fido, ne la papo (*sola scriptura*). En tiuj tri leteroj li klarigas sian reformon kaj doktrinion. Por la Eklezio de Romo, lia doktrino ne estis iu pura kaj reformita - li volis revenon al veroj

15
forĝesitaj - sed iu nova kaj hereza. Je la 3an Januaro 1521, papo Leono la 10a deklaris Luteron herezulo kaj ekskomunikis lin, la plej severa ebla puno. Poste, en la sama jaro, Lutero estis venigita al Worms, kie li aperis antaŭ la germana imperiestro Karlo la 5a, ties princoj kaj reprezentanto de la papo. La imperiestro kaj la papo volis, ke Lutero rezignu sian herezon, sed anstataŭe Lutero defendis sian novan doktrinion: *Krom se mi estas konvinkita de la atesto de la Skriboj aŭ de klara rezono, (ĉar mi ne fidus en la papo nek la koncilioj per si mem, ĉar ili klare kaj ofte eraris kaj memkontraŭdiris), mi estas ligita al la Skriboj, kiujn mi citis, kaj mia konscienco estas kaptito de la Vorto de Dio. Mi ne povas rezigni ajn kaj ne tiel faros, ĉar agi kontraŭ mia konscienco estas nek sendanĝera nek prava. Mi ne povas fari alie.* La imperiestro kondamnis lin. La amikoj de Lutero kaŝis lin en la kastelo de Wartburg. La doktrinoj de Lutero estis disvastigitaj tra Germanujo. Ilin subtenis la et-nobelaro kaj kamparanoj, kiuj ribelis en 1522, trenante Germanujon en militon. La lukto daŭris ĝis 1536, kvankam milito revenis en la 1540-jaroj. Finfine, en la Paco de Augsburg de 1555, post la morto de Lutero, post jaroj de milito, kie nek katolikaj nek protestantaj armeoj povis venki decidige, Germanujo adoptis la principon de "*cuius regio, eius religio*" ("*kies regiono, ties religio*"), laŭ kiu la loka reganto decidas pri la religio de sia regataro. Germanujo en tiu tempo

16
estis regata de multaj lokaj princoj, kiuj estis praktike sendependaj de la imperiestro. Ankoraŭ hodiaŭ Germanujo estas parte katolika, parte protestanta (kaj nun, parte nekredanta). En 1522 en la kastelo de Wartburg, Lutero tradukis la Novan Testamenton el la greka en la germanan lingvon. Poste li tradukis la tutan Biblion (eldonita en 1534). Lia traduko, kaj liaj aliaj skriboj, helpis formi la germanan kiel nacian, normigitan skriban lingvon. La germana lingvo de lia Biblio fariĝis la normo. En 1534 Lutero skribis 65,000-vortan verkon, kiu kontraŭis Judismon. La titolo estis *Pri la Judoj kaj iliaj Mensogoj* (germane: *Von den Jüden und iren Lügen*). Je la 13a de Junio 1525 Lutero edziĝis al eksmonaĥino Katarina von Bora. Li havis ses gefilojn: Johano, Elizabeta, Magdalena, Martino, Paŭlo kaj Margareta. Lia familio loĝis en eks-monaĥejo.

KALVINO

John Calvin, esperantigite Johano Kalvino, denaske Jean Cauvin, naskiĝis la 10an de Julio 1509 en Nyon, Pikardio, Norda Francujo, kaj mortis la 27an de Majo 1564 en Genevo, Svislando. Li multe kontribuis al la disvolviĝo de nova kristana teologia sistemo poste nomita kalvinismo. Li unue laboris kiel humanista juristo antaŭ ol rompi kun la Romkatolika Eklezio ĉirkaŭ la jaro 1530. Kiam komenciĝis la persekutado de protestantoj en Francujo, li fuĝis al Bazelo en Svislando kie li publikigis en 1536 la unuan eldonon de sia fundamenta verko *Instruoj de Kristana Religio*.



En la sama jaro, li estis invitita de Guillaume Farel por helpi al la eklezia reformado en Genevo. La urba konsilantaro kontraŭis la akcepton de la ideoj de Kalvino kaj Farel, tiel ke la du homoj estis forpelitaj. Pro invito de Martin Bucer, Kalvino sekve iris al Strasburgo, kie li fariĝis pastoro de eklezio de francaj rifuĝintoj. Li daŭre subtenis la reformacian movadon de Genevo, kie li estis denove invitita por gvjdi ĝin. Post sia reveno al Genevo, li enkondukis novajn formojn de ekleziaj direktado kaj liturgio, malgraŭ la kontraŭstaro de pluraj potencaj familioj de Genevo, kiuj provis malgravigi lian aŭtoritaton. Dum tiu periodo ankaŭ alvenis al Genevo Miguel Cervet, hispano famiĝinta pro sia hereza doktrino. Li estis denunciata de Kalvino kaj mortpunita de la urba konsilantaro.

Pro la senĉesa alveno de novaj rifuĝintoj favoraj al Kalvino, kaj pro la baloto de nova konsilantaro, la kontraŭuloj de Kalvino devis forlasi Ĝenevon. Li dediĉis la finon de sia vivo al la disvolviĝo de la Reformacio en Ĝenevo, sed ankaŭ tra la tuta Eŭropo. Li estis nelacebla polemika kaj apologeta verkisto, kiu kaŭzis multajn teoriajn debatojn. Li estis multe influita de la verkoj de Aŭgusteno de Hipono kiu interalie inspiris al li la doktrinon de antaŭdestinismo kaj la plenan suveranecon de Dio rilate al la savo. La verkoj kaj predikoj de Kalvino rekte naskis la branĉon de teologio, kiu nun havas lian nomon. Presbiterianoj kaj aliaj Reformitaj Eklezioj, kiuj ĝis hodiaŭ rigardas Kalvinon kiel ĉefa influo de siaj kredoj, disvolviĝis tra la tuta mondo. La ideoj de Kalvino konsiderinde influis gravajn religiulojn kaj tutajn religiajn movadojn, inkluzive de puritanismo. Pluraj historiistoj eĉ sugestis kaj kredis ke kalvinismo kontribuis al la naskiĝo de kapitalismo, individuismo kaj moderna demokratio en Okcidento. Same kiel Lutero, Kalvino kredis je sola fide kaj sola scriptura. Kalvino interpretis la Bibliion por si mem, kvankam li kredis al la Kredo Nicea kaj estis influita de Aŭgusteno kaj aliaj fruaj patroj de la Eklezio. Malsame kiel Lutero, Kalvino kredas al severa formo de antaŭdestinismo: kie Lutero kredis en unuobla antaŭdestinismo, Kalvino kredis en duobla antaŭdestinismo. La unuobla diras, ke Dio, antaŭ la fondo de la mondo, elektis la savotojn kaj

17 poste savas ilin sole per sia senmerita graco; neniam homo ago povas ŝanĝi la antaŭdecidon de Dio. La graco de Dio instigas fidon en la elektito. Sed duobla antaŭdestinismo, en kiu kredis Kalvino, plue diras ke Dio, per elektado de la savotoj, implice kaj konscie elektis la damnotajn, kaj ke ankaŭ la falo de Adamo estis antaŭvolita de Dio. Kie katolika penso diras, ke Dio estas ĉioscia, sed homo posedas libervolon, Kalvino diras, ke Dio estas ĉioscia, *ĉar* lia volo sole estas libera kaj ĉiopova. Laŭ Kalvino, la libervolo de homo kontraŭdirus la ĉiopovecon de Dio. Ni ĉiuj meritas punon, la koleron de Dio, inferon, ĉar ni ĉiuj pekas. Ni, kiel idoj de Adamo, estas tiel pekemaj, ke ni ne povas meriti la favoron de Dio. Sed Dio, per sia kompatado, donacas al iuj - la elektitoj - la gracon de savanta fido en Kristo, kies mortpuno repagas kaj kovras niajn pekojn. Sed tia graco ne estas rajto, ŝuldo, premio, rekompenco aŭ salajro, sed la libera, senmeritebla donaco de Dio. Unu grava, praktika konkludo de la antaŭdestinismo de Kalvino: se Dio donas al vi la gracon por fidi en Kristo, vi estas unu el la elektitoj, tial via savo estas certa kaj neperdebla "unufoje savita, ĉiam savita" estas la devizo. Pro tio, monahismo kaj pentofarado mankas al kalvinismo, kaj eĉ virto al malriĉeco. La elektitoj estas rekoneblaj per tri signoj: 1- konfeso de fido; 2- kristana vivo. 3- amo de la sakramentoj. Laŭ Kalvino, Kristo klare fondis nur du sakramentojn: bapto kaj komunio.

18 Pri bapto, la rito de kristaniĝo, ĝi forlavas viajn pekojn, ne nur pekojn pasintajn sed, laŭ Kalvino, eĉ pekojn estontajn, fariĝante pentofaradon superflua. Pro la ŝablono de cirkumcido, Kalvino instruis ke eĉ beboj povas esti baptitaj. Pri komunio, la rita manĝo de vino kaj pano, per kiu oni partoprenas en Kristo. Laŭ Kalvino, la korpo kaj sango de Kristo nek estas en la pano kaj vino de komunio *fizike*, kiel katolikismo kaj Lutero instruas, nek nure *simbole*, kiel Zvinglo kaj multe de moderna protestantismo instruas, sed *spirite*, kion Kalvino komprenis kiel la antikva doktrino, la doktrino ja de Aŭgusteno. La pano kaj la vino nur estas pano kaj vino, sed kiam ni prenas la panon kaj vinon kun fido, ni partoprenas en la graco de Kristo, kiun li tiam sendas al ni per la Spirito Sankta (kaj ne per la pano kaj vino mem). Pri Diservo, Kalvino permesis kantadon de psalmoj kiel la sola formo de muziko aŭ eĉ belarto en preĝejo. Li malpermesis bildojn de sanktuloj aŭ eĉ de Kristo sur la Kruco; sed li permesis simplan krucon sen bildo de Kristo. Kvankam Kalvino estis severa kaj purisma rilate al Lutero, li estis modera rilate al la Svislando de sia tago. Ekzemple, Kalvino kredis al la Triunuo, beba bapto kaj profesia pastraro. Kalvino estis grave influita de Aŭgusteno, precipe de lia penso pri antaŭdestinismo, sed la kalvinisma doktrino estas multe pli severa ol la aŭgustena (kiu diras ke homo posedas libervolon). Unu el la studentoj de Kalvino estis

Johano Knokso, kiu poste fondis presbiterianismon en Skotlando.

KALVINISMO

Tiu ĉi filio de Kristanismo portas la nomo de la Franca reformisto Kalvino pro lia eminenta influo sur ĝi kaj pro lia rolo en la konfesaj kaj ekleziaj debatoj tra la tuta 16a jarcento. Ĝi ankaŭ estas nomita la Reforma tradicio, la Reforma fido, aŭ la Reforma teologio. La teologia sistemo estis disvolvigita de kelkaj teologiistoj kiel Martin Bucer, Heinrich Bullinger, Peter Martiro Vermigli, kaj Huldrych Zwingli. Hodiaŭ, ĉi tiu termino, kalvinismo, ankaŭ temas pri la doktrinoj kaj praktikoj de la Reformitaj preĝejoj el kiuj Kalvino estis frua gvidanto. Malpli ofte, ĝi povas temi pri la individua instruado de Kalvino mem. La teorio de Kalvinismo estas bazita sur kvin punktoj:

- 1- totala koruptado (*total depravity*)
- 2- senkondiĉa elekto (*unconditional election*)
- 3- ekzakta pago al pekon (*limited atonement*)
- 4- malkontraŭstara gracio (*irresistible grace*)
- 5- persisto de la sanktojn (*perseverance of the saints*)

Ĝi ankaŭ baziĝas sur antaŭdestinismo kaj nerezistebla graco. Ekzemploj de kalvinistaj branĉoj estas Presbiterianismo, Amyrautismo, Puritanismo, Remonstrantismo (liberala).

LUTERO KAJ KALVINO

Oni povus resumi la malsamecon inter Luteranismo kaj Kalvinismo dirante, ke la Luteranistoj pensis jene: «Ni prenu Katolikismon tia

kia ĝi estas, kaj ni forigos ĉion kio kontraŭas la Biblion».



Dum la Kalvinistoj opiniis: «Katolikismo tiel pervertis Kristanisman, ke estas prefere forigi ĉion kaj rekonstrui tute la organizaĵon, forigante ĉion, kio ne estas en la Biblio.» Tiel la vaksandeloj sur la altaroj estis konservitaj de la unuaj, ĉar ili ekzistis antaŭ la Reformacio kaj oni trovas nenion en la Biblio, kio ilin kondamnas; sed la duaj ne konservis ilin, ĉar nenio en la Biblio konsilas ilian uzadon. La rezulto estas, ke Kalvinisto, kiu eniras por la unua fojo en luteristan preĝejon, havas la impreson eniri en katolikan. Verdire la limo inter la du religiaj formoj ne estas foje tre neta kaj reciprokaj influoj okazis. En Elzaco, ekzemple, la superanta luterismo estis tamen influata de kalvinismo: en ĝi, ekzemple, ne ekzistas episkopoj kaj la germana imperiestro Vilhelmo la 2a trovis oponon, kiun li ne atendis, kiam li volis starigi luteristan episkopon en Strasburgo.

eo.wikipedia.org

LARUE REPRELEGOS ĈE EBG:

Bernard-Regis Larue, membro kaj aprecata kutima preleganto ĉe Esperantista Brusela Grupo, programis la sekvantajn prelegojn en nia klubo:

14 septembro - pri Vojaĝo tra Malto
12 oktobro - pri Naskiĝejoj de steloj
23 novembro - pri Galaksioj
25 januaro 2012 - pri plej belaj objektoj de la ĉielo: la katalogo de Messier

ORIGAMION DE SAMY

Samy Loisse, talenta artisto membro de EBG, instruos origamian arton dum "IIK" Internacia Infana Kongreseto en Kopenhago la 23an ĝis la 30an de Julio 2011, kaj ankaŭ dum la somera programo en Greziljono kiu okazos la 15an ĝis la 24an de Aŭgusto 2011. Bonvolu vidi la programon de Esperanto ĉe la kastelo de Greziljono en reteja paĝaro: <http://gresillon.org/>

6 MILIARDOJ

Interesa ekspozicio okazanta en "Turo kaj Taksio", Bruselo, ĝis la 19 de Junio 2011, nomata 6 miliardoj de aliaj homoj kun nekutimaj intervuoj tutmonde, vi povas ankaŭ spekti rete ĉe: <http://www.6miliardsdautres.be>



Erinaco, alias Konstantino Demianenko, kun edzino Jana kaj filo Semiono, vizitis EBG la 20an de Aprilo, longe stirante el Berdjansko, Ukrainujo <http://br11.leadhoster.com/110425>

ANDRÉ DYON-BLANPAIN



Membro de Esperantista Brusela Grupo